# la informilo

***

informbulteno pri esperanto

bulletin bilingue d'information sur l'espéranto

eldonisto:


ESPERANTO-FEDERACIO DE ORIENTA FRANCIO

Fédération Culturelle de l'Est pour l'Espéranto
Maison des Jeunes et de la Culture

27, rue de la République, 54000 NANCY F

PĈK - CCP: 1997-72 W NANCY

nouvelle série
trimestriel
3ème tr. 1978
N° 23



abonnement
un an: 12 F
UNU JARO : 12 F
( 8 INTERN. KUPON. )

## ANTO.... FLASH ★ ESPERANTO.... FLASH ★ ESPERANTO

## VARNA 1978 ( bulgarie ) ★

### LE PLUS GRAND CONGRES UNIVERSEL DEPUIS 1923

Avec près de 4500 participants de 51 pays, le 63ème CONGRES MONDIAL d'ESPERANTO qui a tenu ses assises au cours de la 1ère semaine d'août au bord de la Mer Noire a connu un degré d'universalité rarement atteint. Groupant des congressistes de tous les continents, avec 130 Soviétiques, 70 Japonais, 20 Sud-Américains, plus de 100 Finlandais, 40 Roumains, un demi-millier de Polonais, plusieurs centaines de Tchécoslovaques, plus de 200 Français, des Australiens, des Malgaches, avec des délégations de la Chine et du Vietnam... sans oublier la participation de plus de mille Bulgares, "VARNA 1978" a établi un nouveau record à l'actif de l'Espéranto. Le Directeur Général de l'UNESCO, présent l'an dernier au Congrès Universel de Reykjavik n'a pas manqué, dans son message de soutien, de souligner le rôle de pionniers que jouent les espérantistes dans "l'ouverture de voies nouvelles pour un dialogue véritable entre les peuples et les cultures".

Le prochain Congrès Universel aura lieu à LUCERNE (Suisse) en août 79.

## LECTOURE (FRANCE) A ACCUEILLI LES MEMBRES DU 51EME CONGRES DE SAT ★

du 15 au 21 juillet 1978.

*272 participants de 13 pays ont débattu de thèmes importants parmi lesquels nous citerons " La lutte pour l'application effective de la Déclaration des droits de l'Homme, la dénonciation des fausses voies de la Science et du progrès technique, les dangereuses perspectives du surarmement mondial"*

★

VELIKO TARNOVO, VIEILLE CITE BULGARE, A HEBERGE DE SON COTE 450 JEUNES GENS DE 26 PAYS, tous membres de l'ORGANISATION MONDIALE DE LA JEUNESSE ESPERANTISTE.

Aux fructueuses séances de travail souvent passionnées ont succédé de nombreuses manifestations culturelles ou artistiques.

Le prochain Congrès de"tejo" se tiendra à AUSTERLITZ (Hollande)

---

300 CHEMINOTS ESPERANTISTES DE 18 PAYS SE SONT EGALEMENT REUNIS A ROME

*..... pour leur 30ème Congrès, tandis qu'à la mi-août 60 Educateurs de 12 pays participaient en Italie aux travaux de la 12ème Conférence Internationale de ILEI.*

*Entre autres décisions mentionnons l'organisation de l'exposition internationale de dessins d'enfants au siège de l'UNESCO à PARIS en 1979.*

★

LE 8ÈME STAGE DE L'ESPERANTO PARLE AURA LIEU A NANCY LES 9 ET 10 DECEMBRE 1978

4 cours accélérés d'espéranto seront proposés aux stagiaires. Ces derniers auront par ailleurs le plaisir d'entendre Olivier TZAUT qui dirigera le cours B... mais qui animera également la soirée-cabaret à la Maison des Jeunes et de la Culture "Philippe Desforges."

Le dernier disque de TZAUT est actuellement diffusé dans toutes les parties du monde où il rencontre un franc succès.

★

LE CHANTEUR D'OPERA BULGARE VESELIN DAMIANOV

*a été classé hors-concours lors du 1er festival mondial de la chanson en espéranto organisé dans le cadre du Congrès National de l'UNION FRANCAISE POUR L'ESPERANTO à Clermont-Ferrand au mois de mai dernier.*

*Les 1er et 2ème prix ont été respectivement remportés par Claude PIRON et Olivier TZAUT tous deux originaires de Suisse.*

★

L'ORGANISATION EUROPA-CANTAT qui groupe des choristes de tout le continent chantant en 16 langues prêtera son concours lors du 64ème Congrès Universel d'Espéranto de LUCERNE. Cette grande chorale qui tiendra ses assises dans la même ville au même moment animera en effet la "*soirée helvétique*" qui, à l'instar de la "*soirée bulgare*" de VARNA, sera l'un des points forts des manifestations artistiques qui ponctuent tous les congrès universels. Le congrès de LUCERNE est d'ores et déjà sur le chemin de la réussite.

★

UNE GRANDE REVUE HEBDOMADAIRE D'ACTUALITE EN ESPERANTO *verra-t-elle le jour?*

*C'est en tout cas l'ambition d'un journaliste allemand dynamique, S. MAUL, lequel envisage la création d'un tel périodique dont l'une des multiples originalités serait, en dehors de l'utilisation exclusive de la langue internationale, la contribution à l'échelon mondial de rédacteurs "sans frontières" apportant leurs témoignages directs sans l'intervention des agences de presse.*

*Le n°0 récemment paru, a déjà suscité l'intérêt d'un grand nombre d'espérantophones. Le lancement éventuel de cette revue, unique en son genre, est prévu pour 1979. La souscription est ouverte...*

# * cotisations 1979 *

*Vous venez de recevoir le n° 23 de LA INFORMILO. Il constitue l'avant-dernier n° de votre abonnement pour 1978.*

*Afin de recevoir toute la série de l'an prochain (ainsi que les autres revues auxquelles vous êtes abonné) nous vous présentons les différentes cotisations pour 1979 et vous invitons à vous en acquitter dès maintenant, cette procédure facilitant grandement notre travail tout en vous assurant un service ininterrompu de vos revues.*

Nous vous recommandons vivement de choisir votre cotisation à partir de la catégorie 3. Ce faisant, vous apportez votre adhésion et votre soutien à l'UNION FRANCAISE POUR l'ESPERANTO, association qui agit sur le plan national tant sur le plan informatif général que sur celui des relations avec les instances officielles. Vous concevez aisément que son efficacité et sa crédibilité dépendent essentiellement du nombre de ses adhérents.

*COMMENT PAYER VOS COTISATIONS?*

1°/ Par virement postal à: *FEDERATION CULTURELLE DE l'EST POUR l'ESPERANTO*
*CCP 1997 72 W NANCY*

2°/ Par chèque bancaire à l'ordre de la même Fédération( *ce chèque doit être envoyé à notre trésorier, S-r° André GROSSMANN, 5 rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM)*

## TABLEAU DES COTISATIONS 1979

| CAT | | - de 22 ans | + de 22 ans |
|---|---|---|---|
| 1 - | abonnement simple à LA INFORMILO | 12 F | 12 F |
| 2 - | adhésion simple à la FEDERATION CULTURELLE DE l'EST POUR l'ESPERANTO | | |
| | *membre fédéral (avec abonnement à LA INFORMILO)* | 8 F + 12 F | 8 F + 12 F |
| | *membre fédéral sans abonnement (pour les autres personnes de la famille par exemple...)* | 8 F | 8 F |
| 3 - | adhésion à la Fédération et à l'U.F.E. | | |
| | *membre titulaire junior (avec la revue FRANCA ESPERANTISTO)* | 55 F + 12 F | |
| | *membre titulaire ( + de 22 ans) avec la revue F.E.* | | 80 F + 12 F |
| | *membre sympathisant* | 20 F + 12 F | 20 F + 12 F |
| 4 - | adhésion couplée à U.F.E. et à U.E.A. *(en plus de celle à la Fédération)* | | |
| | membre individuel (reçoit F.E. et l'annuaire de U.E.A. | | 124 F + 12 F |
| | + la revue KONTAKTO si moins de 25 ans | 99 F + 12 F | |
| | membre individuel (reçoit F.E., l'annuaire de UEA et la revue mensuelle mondiale ESPERANTO... | | 190 F + 12 F |
| | + la revue KONTAKTO si moins de 25 ans) | 165 F + 12 F | |

**IMPORTANT** ←

A/ *tous les membres reçoivent la carte fédérale et le bulletin trimestriel régional LA INFORMILO ( pour les abonnés )*

B/ *les membres de l'UFE et de l'UEA reçoivent en plus les cartes de membrede UFE et de UEA (s'ils sont nouveaux adhérents) et les coupons 1979 donnant droit aux services des délégués mondiaux dont l'adresse se trouve dans l"annuaire de UEA.*

C/ *les membres de l'enseignement sont invités à mentionner leur profession car ils seront ainsi inscrits d'office au GROUPE DES EDUCATEURS ESPERANTISTES (GEE) sauf catégorie 2.*

D/ *les jeunes gens jusqu'à 25 ans voudront bien mentionner leur date de naissance (inscription d'office à l'ORGANISATION DE LA JEUNESSE ESPERANTISTE FRANCAISE (JFEO) sauf cat. 2 Ils recevront en plus le bulletin KONCIZE.*

*suite au bas de la page 5*

# 8ème stage de l'espéranto parlé

## 8ª staĝo de parolata esperanto

### 9an kaj 10an de decembro 1978

en NANCY, junuldomo "Philippe Desforges (MJC)
27, rue de la République

Montriĝas pli kaj pli necese, por ĉiuj esperantistoj aŭ lernantoj en Orienta Francio, plej parte izolitaj en sia urbo aŭ vilaĝo, kaj ofte lernintaj Esperanton nur perkoresponde, renkontiĝi okaze de semajnfinaj staĝoj. Dum tiuj staĝoj, dank' al rektmetodaj lernolibroj diversgradaj, ĉiuj havas la eblecon paroli en Esperanto. La franclingvaj gramatikaj klarigoj estas minimumaj en la kursoj A1 kaj A2, preskaŭ ne ekzistas en la kurso B.

*Ni ĝojas certigi al vi, ke dank' al la fame konata kantisto Olivier TZAUT, el La Chaux de Fonds (Svisio) ĉiuj certe trapasos agrablan vesperon sabate!*

Ni invitas samtempe ĉiujn esperantistojn (eĉ komencantojn!) en najbaraj regionoj en Francio, Germanio, Belgio kaj Luksemburgio veni por praktiki kune la internacian lingvon.

**ESTOS 4 KURSOJ**

KURSO A-1 → *por tuj komencontoj*

KURSO A-2 → *por jus komencintoj, kiuj atingis proksimume la duonon de la unuagrada kurso*

KURSO B → *por tiuj, kiuj finlernis la unuagradan kurson: ili povos simple babili inter si helpe de la tekstoj de la kantoj de Olivier TZAUT*

KURSO C → *la lingvoposedantoj fajne konfirmos kaj rigore kontrolos sian lingvoposedon. (La studdokumentojn ricevos ĉiu partoprenonto komence de la staĝo)*

**programo**

SABATON, 9an de decembro: bonvolu alveni antaŭ la 14a30, por ke la kursoj povu komenciĝi akurate je la 15a. Jen la laborritmo: *kurso (45 minutoj), ripozo (15 minutoj) ĝis la 19a.* Tiam funkcios libroservo. Je la 19a30, komuna vespermanĝo. Vespere ni ĝuos tre amikan kunĉeestadon dank' al Olivier TZAUT.

DIMANĈON, 10an de decembro: matenmanĝo (*atentu! nur ĝis la 8a horo!*)
ni "parolos" de la 9a ĝis la 11a45 (samritme kiel sabate)
poste libroservo kaj ... tagmanĝo je la 12a30
posttagmeze povos okazi diskutoj (proponu temojn!), amika kunestado, urbo- aŭ muzeovizito

*Eblas trapasi ekzamenon nome:* ATESTO PRI LERNADO
" PRAKTIKA LERNADO
" KAPABLECO (*skriba parto*)
} *principe dimanĉe matene*

*Ankaŭ eblas restadi en NANCY antaŭ kaj post la staĝo, sed bonvolu precizigi tion!*

LA NOMBRO DE LA LITOJ ESTAS LIMIGITAJ JE 50

ALIĜU SUFIĈE FRUE !!

**KOSTOJ**

*Aliĝkotizo* — *16F por ĉiu persono. La Federaciaj Membroj, Abonantoj al LA INFORMILO kaj iliaj familianoj, la gejunuloj sub 15 jaroj pagos nur 10F*

*Manĝo (tagmeza aŭ vespera) 13F* — *Tranoktado kaj matenmanĝo (por unu persono) (En unulita ĉambro: 28F rezervitaj por la unuaj aliĝontoj En du-lita: 23F En 3- 4-lita: 20F)*

Priatentu! Tiuj prezoj validas la 1an de septembro. Eta plialtiĝo ebla.

# → aliĝilo

Bonvolu detranĉi aŭ rekopii kaj sendi kun antaŭpago de 20F por ĉiu persono, kiel eble plej frue, kaj antaŭ la 25a de novembro 1978, al

S-ro J.P. COLNOT
15 rue de Lavaux, 54520 LAXOU
PCK° 1272-21 L NANCY

(bonvolu krucumi laŭdezire en la eta kvadrato)

Sr° ☐ S-in° ☐ F-in° ☐ nombro de personoj:

NOMO: ANTAŬNOMO:

ADRESO:

Tago kaj horo de alveno:

Mi rezervas lito(j)n en ĉambro kun lito(j) sabate vespere.

Suplementaj noktoj (eventuale):

Mi rezervas manĝo(j)n sabate vespere por personoj, dimanĉe tagmeze por personoj.

Aliaj manĝoj (eventuale):

Mi partoprenos en kurso A1 ☐ A2 ☐ B ☐ C ☐

Mi antaŭmendas la jenajn verkojn: (Kursoj A1, A2, infanoj) Junulkurso 20F ☐
suplemento 4F ☐
kaseto 30F ☐
disko-serio 30F ☐

Kurso B disko "TRA LA MONDO!" 50F ☐

Kurso C (la studdokumentoj estos surloke disdonataj)

Por ĉiuj (laŭdezire tutevidente!!...) Lexique Fondamental E°-Français 9F ☐
Dictionnaire Pratique 32F ☐
Dictionnaire Français- Esperanto 28F ☐
Grand Diction. Esperanto-Français 60F ☐

(eventuale) Mi deziras trapasi ekzamenon atesto pri lernado ☐
atesto pri praktika lernado ☐
atesto pri kapableco ☐

---

suite de la page 3

E/ les membres qui payent leurs cotisations par l'intermédiaire du GEE ou de JFEO, ainsi que les "membres à vie", voudront bien payer à part leur abonnement à LA INFORMILO comme indiqué.

F/ exceptionnellement, les membres du Groupe de Strasbourg, dont la trésorière est S-in° STAHLBERGER, 17 rue de Lampertheim, 67800 BISCHHEIM, sont priés de verser leurs cotisations au CENTRE CULTUREL ESPERANTO, CCP 49917 STRASBOURG, en y ajoutant leur cotisation au Groupe de Strasbourg: 10F.

*nomo kaj antaŭnomo de la akompanontaj personoj:*

*naskiĝdato por junuloj sub 15 jaroj:*







**Tuj aĉetu numeron nul de**

**SEMAJNO**

**internacia magazino sendependa**

unika aktuala semajna revuo en la internacia lingvo, kun multaj interesaj artikoloj sur 40 paĝoj. Leginda por esperantisto de ĉiu lando, ĉiu aĝo, ĉiu medio.

Konvinkiĝu mem!

Vi ricevas numeron nul (provnumeron) de SEMAJNO kontraŭ pago de 3,– gmk al poŝtkonto Nbg 65092-858 (S. Maul, Semajno, Augsburg) aŭ sendo de 4 internaciaj respondkuponoj (nur el nepagipovaj landoj) al

S. Maul, SEMAJNO, Singerstraße 1/III,
D-8900 Augsburg, FR Germanio.

**Grupoj ĝuas rabaton de 10 %**

ĉe mendo de pli ol 5 ekzempleroj. Subskripcia kampanjo nur ĝis meze de decembro 1978!

Klare skribu vian adreson!

## LEĜPROPONO KAJ DEPUTITOJ

Kiel vi povis legi en FRANCA ESPERANTISTO n° 310, la nova registaro nuligis ĉiujn leĝo-proponojn, do la propono n° 1667 koncerne Esperanton ne plu validas.

S-in° NAU (Montigny-lès-Metz) komitatanino de nia Federacio, kiu plej sukcese instigis la departementajn konsiliantojn de Mozelo voĉdoni rezolucion favoran al Esperanto (ĝia teksto aperis en nia lasta INFORMILO), nun ricevis el S-r° LAURAIN, deputito de Mozelo, la jenan leteron:

*... Suite à ma lettre du 15 juin 1978 vous informant que j'allais intervenir dans les meilleurs délais auprès des organismes concernés pour obtenir la diffusion et l'usage de l'espéranto dans les relations internationales.... je me propose de redéposer la proposition de loi lors de la prochaine session parlementaire d'automne, ce problème m'intéressant particulièrement....*

*... je ne manquerai pas de vous transmettre le document que je vais soumettre à mon Groupe...*

(noto: S-r° LAURAIN apartenas al la Socialista Partio)

Estas necese de nun, ke en ĉiuj departementoj oni kontaktu la diversajn deputitojn por scii, kiuj el ili estas favoraj al esperanto kaj estus pretaj ĉu deponi, ĉu subteni novan leĝoproponon. Mi mem jam skribis al 3 deputitoj en "54". Bonvolu informi min pri viaj klopodoj.

J.P. COLNOT

## LA SEPA STAĜO...

okazis en Nancy la 17an kaj 18an de junio. Ĝin partoprenis entute 61 personoj. Okazis la kutimaj kursoj, ĉeestis multaj gejunuloj (ĉefe gelernantoj de lernejo de Toul kaj lernantinoj de kolegio en Obernai).

Sekve al tiu ĉeesto estiĝis certa bruo en la Junuldomo, malfrue vespere kaj frumatene. Oni komunikis al ni kelkajn plendojn el aliaj gastoj de la Junuldomo...

Sabate vespere oni prezentis diapozitivojn, kelkajn ludojn kaj kantojn. Dimanĉe krom la kursoj, okazis ekzamenoj -kies rezultatojn vi legos aliparte-, posttagmeze urbovizito por kelkaj, vizito al tropika akvario por alia grupo.

Dum la du tagoj funkciis vigle 2 libro-servoj. Ĉiuj rendevuis por la decembra staĝo.

Jen konsilo: *Aliĝu frue al tiu staĝo, kiu estos animata de Olivier TZAUT, ĉar verŝajne litoj mankos! (Ne miskomprenu!... mi ne volas aludi, ke Olivier dormigos nin!... ĉiu, kiu konas lin, jam scias, ke estas malfacile forlasi la salonon, kiam li muzikas aŭ gitaras!!)*

JPC

## EĤOJ EL LA STAĜO

el S-r° LUDWIG (kurso C): *la staĝo povus esti difinita per unu vorto, kiun tre bone konas niaj anoj: espero! Dank' al la multaj ĉeestintaj gejunuloj nia movado faros grandan paŝon antaŭen, montrante al ĉiuj eblaj dubantoj kaj kritikantoj, ke E-° tute ne fiaskas sed male nehaltigeble progresas...*

el S-r° GUILLAUME (kurso B): *... mi kaj miaj familianoj estas kontentaj pri nia partopreno en la staĝo. Ni sendube ĉeestos la staĝon dum decembro...*

el S-r° B. VIVIER (kurso A2): *... mi opinias, ke la staĝo en NANCY estis tre interesa kaj ke esperantistoj estas tre simpatiaj...*

## SUKCESOJ EN LA EKZAMENOJ

Atesto pri lernado: B. AUNIS, H. BARBAROSSA, Cl. BERTIN, Chr. BOUGE, C. CANCEL, M. DEXMIER, P. FAVERGE, R. GUILLAUME, Fr. GUILLOIS, Y. GUEGUENIAT, Ph. HOFFMANN, P. HURE, P. JARZABEK, P. KOPECZ, B. LAMBRON, S. LASSARTE, M. LEFORT, M.-Th. MAS, A. MATSCHEK,

.../...

Ph. MILESI, R. PIERRE, E. POLO, P. REMY, Fr. SACHS, G. SALMON, S. SCHAAK, Y. SCHEFFER, Cl. SWICHOKA-LEONARD, R. VEU, B. VIVIER, M. WILD, M. DE ZILAH.

Atesto pri praktika lernado: D. HAUSER, S. LASSARTE, A. MATSCHEK, B. VIVIER.

Atesto pri kapableco (skriba parto) : C. DENIS, I. DENIS, M. LUDWIG

La Direktorino de la ekzamencentro aldonas tiun rimarkon:

... *la nombro kaj la kvalito de la kandidatoj estas ja tre kontentiga kaj laŭdinda. Sincerajn gratulojn!...*

KONGRESO DE AMIKECO

*En Luksemburgo okazis, de la 13a ĝis 17a de julio, tiu ĉiu-jara aranĝo, kun promesplena titolo, de S-ro DELAIRE, direktoro de CENTRE NATIONAL ESPERANTO-OFFICE en Orléans.*

*Nu, la turista parto de la programo estis ja alloga, kaj bela vetero ĝenerale ĝin favoris. Du vesperojn majstre gvidis respektive S-ro KINDLER kaj magiisto TRIKSINI (kiuj estas ja unu sola homo!). Entute la aranĝo estis certe partopreninda, en ofte ĝoja etoso.*

*Unu punkto tamen ŝajnas al mi bedaŭrinda: inter la francaj partoprenintoj tro regis la opinio, ke Esperanto estas ja nur helplingvo, kiun oni ne uzu inter sam-nacianoj, ĉar ĝi aspektas tiam tro "artefarita"... Se tia vidpunkto estas komprenebla ĉe komencantoj, ĝi ne plu estas akceptebla ĉe pli spertaj homoj, ĉar oni atingis la ĵenan situacion: la Francoj "krokodilis" inter si kaj niaj kompatindaj amikoj el Nederlando kaj Germanio devis, ĉu same krokodili inter si, ĉu paroli Esperanton nur inter si! Mi ne forgesu citi la Luksemburganojn kaj la Belgojn, kiuj ja komprenis la francan kaj ŝajne estus preferintaj aŭdi iom da Esperanto...*

*J.P. COLNOT*

★ Katia kaj Daniel havas la ĝojon informi vin pri la naskiĝo de sia fratineto Sonja en la hejmo de nia kasisto André GROSSMANN en BALDERSHEIM la 18an de julio.

Al tiu nova denaska esperantistineto parolas la patro jam en esperanto, la gefratoj france kaj la patrino japane....

★ Iom antaŭe, la 5an de aprilo, Sinjorino Danièle HAUSER en VANDOEUVRE, komitatanino de nia Federacio, fariĝis patrino de eta Boris....

★ ...kaj ankoraŭ pli frue, la 14an de februaro en BAR-le-DUC, Séverine ANDRÉ "geavigis" niajn amikojn P. kaj C. DENIS....

Sincerajn bondezirojn al la beboj kaj gratulojn al la gepatroj... kaj geavoj!

*Ĉi-jare la "granda vojaĝo de la klubo "Arto kaj Vojaĝo" de la liceo Fabert estis iom malsimila al la antaŭaj. Ni ne povis ekveturi matene, kiel laŭkutime, kun la unuaj radioj de la printempa suno, post la rapide fintrinkita kafo kaj la atendo de la matenmanĝo en ia restoracieto ĉirkaŭ je la sepa, post tri horoj da veturado en la buso estre stirata de S-ro Salsmann, nia bus-stiristo de antaŭ 10 jaroj. La rektorata permeso nur ebligis al ni forflugi el la kaĝo je la 12a, post la kursoj. Do ni faris nian unuan "grandan vojaĝon forlasante Messon je la 1a posttagmeze. Sed tio-ĉi ne estis la nura malsimilaĵo. Unuafoje en la historio de la liceo Fabert, kaj do de la klubo "Arto kaj Vojaĝo", la buso entenis 15 esperantistojn, el ili deko aliĝinta la du klubojn: "Arto kaj Vojaĝo" kaj "Esperanto". La aliajn jarojn ni vizitis nur Amsterdamon, maljuna urbo kun arteca kaj ekzotikeca etoso, kie oni povas admiri la pentraĵon de Frans Hals, Rembranto, Vermero kaj aliaj, vidi kun ektremo la putinojn kvazaŭ senvestitajn en la fenestroj, diskutadi poste pri la moralo, grandeco kaj malgrandeco de la homa esto.*

*Ĉi-jare, pro la ĉeesto de la esperantistoj, ni aldonis al la programo la viziton de Roterdamo, ĉar tie kuŝas la domo de la centra oficejo de UEA. Ĉi-tiun aldonon neniu bedaŭris, ĉar ni eklernis, ke en Roterdamo ankaŭ estas belega muzeo kun aliaj pentraĵoj de Rembranto, Vermero kaj Boŝ, kaj ke la haveno de la urbo estas grava vidindaĵo.*

Nu, ni forlasis Messon merkrede je la unua, la 3an de majo, sed ni ne alvenis samtage Roterdamon, ĉar la unuan nokton ni trapasis en Bruselo, kie ni iom promenadis kaj dum la vespero vidis bonan, modernan teatraĵon. Promenade ni montris al amikoj la librovendejon kie mi, de antaù du jaroj, ricevis senpage libron pri NEO, iu artefarita lingvo. En la antaùparolo la aùtoro indikas kaj klarigas, kial li faris novan lingvon kaj komparis sian lingvan skizon kun esperanto. El ĉi-tiu libro mi nur legis la antaùparolon enhavantan la komparadon, kaj mi ekkomprenis, ke mi devas lerni... Esperanton!

La mor-gaùon, post bonega matenmanĝo, ek al Roterdamo! EStis la 4a de majo, festotago sed la gesamideanoj, malgraù ĉi-tio, atendis nin en la domo n° 176, Nieuwe Binnenweg. La domo bele aspektas, nederlandane, kvaretaĝe. Post la enirpordo komencas blanka, marmo-ra, eskaldekliva ŝtuparo. Prizorgu viajn maleolojn! Tuj post la ŝtuparo la oficejo de la direktoro, la telefono la plej internacie uzata en la mondo, kiu tamen konas nur unu lingvon... precize la internacian. Sed la ridetanta angla samideanino, voluntulino, gvidas nin malproksimeten. Jen la ĉambro, kie la revuoj kompostiĝas. Ni mire rigardas la kompost-maŝinon. Ĝi estas malgranda kiel granda tajpmaŝino; sed ĝi valoras je FF 40000. Antaù la fenestro, torso de Zamenhof. Malantaù, ĝardeneto. La tuta domo aspektas efika, ordigita, pura. Ĉiuj ni sentas nin hejme. Kiam ni eniras la ĉambron "Kanado", ni ne scias, kion ni rajtas plie miri: la librojn de la biblioteko aù la riĉajn skulptitajn meblojn, do ni miris la du. Ni rigardas la estrarkunsidejon, aliajn laborĉambregojn kaj fine ni haltas en la reĝejo de la aĉeteblaj libroj.

*Mi forgesis diri: ni jam estis pli ol dudek, kaj meze la geesperantistoj estas neesperantistaj geamikoj. Ĉi-tiu fakto pravigas la krokodilecan brueton, kiu akompanas la paroladon de nia gvidanto: niaj klubanoj fieras pri sia domo kaj estas krokodiligantaj la klarigojn! Bone, ĉi-tiuj geamikoj venontjare scipovos esperanton!*

Do ni komencis aĉeti librojn kaj esperantaĵojn. Kiam ni forlasas la domon, ĉiuj el ni minimume havas du verdajn steletojn. Iuj aĉetis verdsteletajn kovertojn kaj disdonas ilin al la aliaj: ĉiam korespondu propagande! Oni aĉetas poŝatlason, flageton kaj multe da libroj de Prezidanto Maù Ze Dong: libroj belaspektaj kaj malmultekostaj. Poste oni diskutas... diskutas... diskutas! La etoso estas altanima. La grupoj forlasante la domon decidiĝas interparoli "esperante" en la strato, kaj uzi la internacian lingvon en la restoracioj celante plian propagandon.

Ni volis viziti la domon de Esperanto dum 20 minutoj, ni enrestis dum du horoj. Dankon Simo Milojeviĉ, dankon samideanoj. Ankaù dankon pro la kafo, kiun vi ofertis al ni poste!

Eùgeno De Zilah



# distra angulo



## KRUCVORTENIGMO

|  | 1 | 2 | 3 | 4 | 5 | 6 | 7 | 8 | 9 | 10 |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 1 |  |  |  |  |  |  |  |  |  | * |
| 2 |  |  |  |  | * | * |  |  |  |  |
| 3 | * |  |  |  |  | * |  |  |  |  |
| 4 |  |  |  |  |  |  |  | * |  |  |
| 5 |  |  |  |  |  |  | * |  |  |  |
| 6 |  | * | * |  | * | * |  |  |  |  |
| 7 |  |  |  |  |  |  |  | * |  |  |
| 8 |  |  |  |  |  | * |  |  |  |  |
| 9 |  |  |  |  |  |  | * |  | * |  |
| 10 |  |  |  |  |  |  |  |  |  | * |

### HORIZONTALE

1 amerika krokodilo
2 germana antaŭnomo - malobservi religian leĝon
3 demandovorto - hispana urbo
4 parto de starhorloĝo - artiklo
5 kohere kaj racie - prepozicio
6 konstelacio (radiko)
7 oficejo de komerca entrepreno - nedifina pronomo
8 frakcio (radiko) - gaso (radiko)
9 fungo
10 ebliganta ampleksigi per unu sola rigardo la diversajn partojn de iu tuto.

### VERTIKALE

1 ĉe la kapo de akademio - krucigas fadenformajn objektojn
2 hejma servisto de riĉuloj - manĝa, trinka kaj seksa diboĉo (radiko)
3 siringo senkapa kaj senvosta - posesiva adjektivo (akuzativo)
4 batalinto en cirko je la roma pratempo
5 difinita parto de spaco (radiko)- arbo (inverse)
6 prepozicio (inverse) - malpuraĵo (fonetike)
7 drogo - laŭtigi la voĉon por altiri atenton (fonetike)
8 moderna, subtera vagonaro (franca siglo) - pronomo - guma rezino (radiko)
9 optika lenso
10 ia protokola ceremonio.

## SILABENIGMO

*pere de la ĉi-subaj alfabete ordigitaj siloboj vi plenigu la kolonojn laŭ la donitaj difinoj dekstre . La 1a kaj la 3a kolonoj eldonas proverbon se vi legos ilin vertikale.*

or

ab ak ak am an an do ed en fe jo ki kr lo lt lu ma no o o o o ok ok on po ra re ri si si sm st tal te to to ul uso

+ - + - - - akvotransportilo
+ - + - - - supermezura
+ - + - - neteksita ŝtofo
+ - + - - sur la vizaĝo
+ - + - rundforma, praktika objekto
+ - + - nederlanda urbo
+ - + - - tertremo
+ - + - - preskaŭblinda mamulo
+ - + - - kalkulilo
+ - + - - - fari unudirektan linion
+ - + - - - paganto de interkonsentita prezo
+ - + - - - ludi rolon
+ - + - - - - ĝardenfloro
+ - + - - - eliras el anodo

*Al niaj fidelaj kuncerbumantoj! Pro teknikaj kaŭzoj la solvoj de la tri lastaj "problemoj" aperos en la venonta n° de LA INFORMILO.*

imprimé par les soins du Secrétariat des Associations, 12 rue Voltaire, 55000 BAR LE DUC. Le rédacteur: Pol DENIS. Le Directeur de la publication : J.P. COLNOT
Dépôt légal n° 245